# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' . --- Sceno kvar

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la kvaran scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

### A- parto

1. virtuala --------------------
2. patento --------------------
3. kriterio --------------------
4. konspiro --------------------
5. ĵuri --------------------
6. metaforo --------------------
7. transformi ------------------
8. ponardo --------------------
9. imposto --------------------
10. kompili --------------------

A. dokumento kiu protektas rajtojn je inventaĵoj
B. eligi fortan sonon
C. faktoro je kiu bazi decidon
Ĉ. idea bildo
D. kunmeti kolekton
E. kunordigita plano malhelpi al iu
F. mono pagenda al registaro
G. ŝajn-ekzista
Ĝ. ŝanĝi
H. solene promesi
Ĥ. speco de tranĉilo
I. subita brila ideo

### B- parto

1. asimili --------------------
2. tamburino -------------------
3. slogano --------------------
4. vortaro --------------------
5. ideala --------------------
6. kandidato --------------------
7. risko ------------------
8. okulfrapa --------------------
9. sugesto --------------------
10. akronimo --------------------

A. speco de tranĉilo
B. propono
C. perfekta
Ĉ. mallongigo
D. libro kiu donas vort-difinojn
E. lerni kaj kompreni
F. kliŝa frazeto
G. homo strebanta plenumi oficon
Ĝ. frap-muzikilo
H. esti preskaŭ sama
Ĥ. ebleco de danĝero
I. atento-veka

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. Dum ĉi tiu sceno Ken estas daŭre ________.**
a) elira
b) delira
c) kolera
ĉ) espera

**2. Mike estis transformita al _______.**
a) piro
b) pomo
c) virino
ĉ) Venuso

**3. Meri diris ke oni ne parolu pri malsukcesaj eksperimentoj, sed pri ________.**
a) duon-sukcesaj
b) preskaŭ sukcesaj
c) evidente plene malsukcesaj
ĉ) malpli evidente sukcesaj

**4. Ili verŝis la dek postulojn en ___________**
a) kaf-muelilon
b) komputilon
c) kategoriojn
ĉ) kandidatojn

**5. Estis dek postuloj. Alia fama kolekto de deko estas la _________.**
a) mortigaj pekoj
b) ordonoj de Dio
c) disĉiploj de Jesuo
ĉ) ĉevaloj de la apokalipso

**6. Ĉu la sciencistoj jam sciis pri Esperanto?**
a) Jes, kelkaj eĉ parolas ĝin.
b) Jes, kelkaj estas membroj de UEA.
c) Jes, sed neniu parolas ĝin.
ĉ) Ne, ili ne scias pri ĝi.

**7. TEJO, UEA, ILEI kaj ETMENSA estas _______.**
a) sinonimoj
b) antonimoj
c) akronimoj
ĉ) pantomimoj

**8. Ili metis la transformitan piron en vitran skatolon, por ke __________.**
a) Ken ne manĝu ĝin
b) la polica esploristo ne konfisku ĝin
c) ili poste sendu ĝin al Venuso
ĉ) la publiko povu admiri ĝin

**9. La samideanoj sendotaj al Venuso estu prefere ________.**
a) naivaj
b) kreviaj
c) stoikaj
ĉ) laikaj

**10. La sciencistoj eksciis kio estas samideano ĉar la komputilo __________.**
a) tuj donis tiun informon
b) maltuj donis tiun informon
c) ligis ilin kun la retadreso de la samideanoj
ĉ) diris ke ilia naiva koeficiento estas ekstreme malalta

## 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon, sed nun tamen ne temas pri tia helpo.*

Ĵ A V O N O  □ □ __ __ □ __

P A L B L U E S E K T A  □ □ __ □ __ __ __ □ __ __ __ __

P O K A B L A  □ □ __ __ __ __ □

R A D M I N I  __ □ □ □ __ __ __

Bert estas la rezulto de __ __ __ __ __ __ __ __ __ __ __ __ __

## 4) DEMANDOJ

1. Kie kaj kiam okazas la sceno? Kiuj laboras fone?
2. Kiuj estas la tri celoj de la kunsido? Kiu okupos la plej longan tempon?
3. Kiom da eksperimentoj ili plenumis kaj kun kiuj rezultoj?
4. Ili sukcesis sendi ok virojn; sed pli ĝuste dirite, kio okazis?
5. Kio estis la rezulto de la eksperimentoj sur Ken?
6. Kiel oni devis nomi la malsukcesajn eksperimentojn?
7. Ili transformis piron al viro. Kiusence li estas verda?
8. Ili transformis pomon al viro. Kiusence li estas verda?
9. Kial la sciencistoj devas paroli pri samideanoj?
10. Kial soldatoj maltaŭgas por la projekto? Kion fine faros la sciencistoj?

## 5) PARIGU

*Jen fraz-komencoj kaj fraz-finoj pri la sceno. Ligu ilin. Kio? Du superfluaj fraz-finoj? Nu, jes, evidente. Tro bonkora mi ja estas, sed ne senfine!*

| | |
|---|---|
| 1 La sciencistoj kunvenis ĉar ili vidis | A. altan naivecan koeficienton. |
| 2. Ili intencas komercigi... | B. dek plej gravajn trajtojn por sendoto |
| 3. La sciencistoj sukcese sendis.. | C. du virinojn, tri virojn kaj Ken kvinfoje. |
| 4. Ili ne rajtas diskonigi... | Ĉ. hejmpaĝon kaj retadreson. |
| 5. Ili uzis eksperimenton por malaperigi... | D. ilian grandiozan malkovron. |
| 6. Sur la piro en la montro-skatolo ili vidis... | E. impost-inspektoron. |
| 7. En unu eksperimento el viro ili kreis... | F. la lumon ĉe la fino de la tunelo. |
| 8. Adela kompilis liston kiu prezentas... | G. piron kun blua helmo. |
| 9. Se Esperanto ekzistas, ĝi devas havi... | Ĝ. rezultojn de malpli evidente sukcesaj eksperimentoj. |
| 10. Samideanoj havas eksterordinare... | H. sameojn kaj sav-armeanojn. |
| | Ĥ sennombrajn obstaklojn . |
| | I. unu virinon. |

.

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).**